Tomasz Malicki
(Kraków, Pollando)

Sistemo de edukado en Pollando

Edukado estas unu el sferoj de la vivo, kiuj ne konvenas al unuigo. Ĉiu ŝtato povas libervole fondi sian edukan sistemon. Oni devas memori, ke en unuiĝinta Eŭropo junaj poloj serĉados laborlokojn kaj konkurados je lokoj en altlernejoj kun samaĝuloj el aliaj landoj. La pola eduka sistemo devos do esti tiel konstruita, ke ni havu ŝancojn trovi sian lokon en Eŭropo.

En la jaro 1999 komenciĝis en Pollando la multjara kaj ampleksa reformado de programoj kaj metodoj didaktikaj-edukaj kaj de lernejaj strukturoj. Ĝi celis plibonigi la eduksistemon kaj adapti ĝin al bezonoj de la mastrumado apogita je scio, garantii por la tuta loĝantaro aliron al la sistemoj de konstanta lernado kaj proksimigi ligojn inter altlernejoj kaj bizneso, kies estado en aliaj landoj favoras teknologian transferon.

En la duono de la 90-aj jaroj de la 20-a jarcento en Pollando, superan edukiĝon posedis 6,8 % da loĝantaro, postmezlernejan (duonsuperan) - 2,6 %, mezan - 50,5 %, fundamentan - 33,7 % kaj ne finitan elementan aŭ nenian - 6,3 %. Inter la jaroj 1988 kaj 2006 la procento de la personoj posedantaj: superan edukiĝon en la tuta loĝantaro pligrandiĝis de 6,5% ĝis 14,6%, mezan edukiĝon pligrandiĝis de malpli ol 25% ĝis 35%. En la jaro 2006 la universaleco de la edukiĝo la meza kaj pli alta estis en Pollando procente pli alta ol tiu universaleco en la landoj de Eŭropa Unio.

En la plimulto de eŭropaj landoj la lerneja devigo komenciĝas en la sesjariĝo, sed estas esceptoj: pli frue ĉar en la aĝo de 5 jaroj komencas lernejan edukon infanoj en Nederlando kaj en Britujo kaj plej frue ĉar jam en la aĝo de 4 jaroj - en Norda Irlando. Ĝenerale en landoj de Eŭropo Orienta pli malfrue komenciĝas la lerneja devigo - en la aĝo de 7 jaroj. La sama situacio estas ankaŭ en Pollando, kio kaŭzigas, ke multaj polaj infanoj kaj gejunuloj havas jam pro la eduka leĝpremiso pli malgrandajn ŝancojn por la bona lerneja eduko. En la mondo oni sukcese praktikadas plilongigon de la periodo de estado de infanaro en lernejoj. La lasta eduka reformo en Pollando, en la jaro 1999, ankaŭ sekvis ĉi spuron kaj oni enkondukis la 6-jaran elementan lernejon kaj ankaŭ devigan 3-jaran gimnazion, anstantaŭ la ĝisnunan 8-jaran elementan lernejon. Tio plilongigis la periodon de la eduka sistemo je unu jaro.

En la plimulto da landoj lernantoj frekventas lernejojn dum kvin tagoj semajne (ses en Luksemburgio kaj en kelkaj regionoj de Italio). Depende de la lando, de la tago de semajno kaj de la aĝo de lernantoj diversa estas ankaŭ la taga kvanto da lernejaj okupoj. Ekzemple la lernojara kvanto da okupoj por lernantoj en la aĝo ĉirkaŭ 10 jaroj en Nederlando estas 1000 horoj kaj en Latvio nur 490 horoj. En la landoj de Orienta Eŭropo estas la jara kvanto - ĉirkaŭ 600 horoj. En unu el ĉi landoj, kiuj kune kun Pollando aliĝis al Eŭropa Unio estas averaĝe granda nombro da horoj - ĝi estas Cipro kun 812 horoj. En Pollando la jara kvanto estas 635 horoj, tiel do en la komparo kun Okcidentaj Landoj tio estas malpli je 350 horoj dum la jaro, malpli je ĉirkaŭ 2 horoj ĉiutage.

La reformita en 1999 jaro sistemo de edukado en Pollando konsistas el du partoj (skemo malsupre):

- la eduksistemo,
- la sistemo de la supera edukado.



La skemo prilaborita je la komisio de Buroo de Konfirmo de Klerigo kaj Internacia Interŝanĝo (junio 2002)

La tri unuaj gradoj de la sistemo de edukado: antaŭlernejo, elementa lernejo kaj gimnazio donas homogenan edukan oferton por la infanoj en la aĝo ekde 6 ĝis 16 jaroj. La diferenco de la oferto ekestas je la grado de la postgimnaziaj lernejoj. Postgimnaziaj lernejoj estas jenaj:

- trijaraj ĝeneralklerigaj liceoj, kies finigo ebligas ricevon de abiturienta atestilo;
- trijaraj profiligitaj ĝeneralklerigaj liceoj, kies finigo ebligas ricevon de la abiturienta atestilo;
- kvarjaraj teknikumoj, kies finigo ebligas ricevon de la abiturienta atestilo;
- faklernejoj 2-3 jaraj, kies finigo ebligas ricevon de la diplomo konfirmanta fakajn scipovojn kaj ankaŭ ebliganta daŭrigon de la klerigo en dujara liceo aŭ en trijara teknikumo;
- dujaraj liceoj, por la diplomitoj de bazaj faklernejoj, kies finigo ebligas ricevon de la abiturienta atestilo;
- trijaraj teknikumoj kompletigaj, por diplomitoj de bazaj faklernejoj, kies finigo ebligas ricevon de la diplomo konfirmanta fakajn kvalifikojn kaj ankaŭ ebliganta ricevon de la abiturienta atestilo;
- postliceaj ĝis 2,5 jaraj lernejoj, kies finigo ebligas al personoj posedantaj mezan klerigon ricevon de la diplomo konfirmanta profesiajn kvalifikojn;
- trijaraj specialaj lernejoj por lernantoj kun la psikaj handikapoj kaj por lernantoj kun la kompundaj handikapoj, kies finigo ebligas ricevon de la atestiloj konfirmantaj lertecon por laboro.

La sistemo de la edukado entenas ankaŭ aliajn ejojn eduk-lernigajn, de la konstanta edukado, de la praktika edukado, centrojn de la aldona klerigo kaj de la faka plibonigado, artismajn centrojn, konsilantejojn psikologi-pedagogiajn, junularajn centrojn edukigajn, junularajn centrojn de socioterapio, specialajn lernoedukigajn kaj edukigajn prizorgejojn, Voluntigajn Labortaĉmentojn, ejojn por edukigo kaj ejojn de la plibonigado de geinstruistoj, pedagogiajn bibliotekojn, kolegiojn de laboristaj sociaj servoj.

Konsente kun la preskriboj de la Konstitucio de Pollando ĉiu civitano havas la rajton por edukiĝo. La edukado estas deviga ĝis la 18 vivojaro. La edukado en la publikaj lernejoj estas senpaga. La inkluziva tempo de la lernado ĝis la momento donanta eblecon ekzameniĝi abiture egalas al 12-15 jaroj. Post la abituriĝo diplomitoj ricevas abiturientajn atestilojn rajtigantajn pretendi al altlernejoj.

Kiel aspektas la sistemo de supera edukado?

En Pollando ekzistas ŝtataj (publikaj) altlernejoj kaj kreataj ekde la jaro 1999 neŝtataj altlernejoj. Neŝtataj altlernejoj estas fondataj surbaze de la permeso de Ministerio de Nacia Edukado kaj Sporto kaj ricevas leĝan subjekton post la enskribo al la registro de neŝtataj lernejoj, gvidata fare de tiu ministerio.

Ekde la jaro 1998 estiĝas ŝtataj kaj neŝtataj fakaj altlernejoj. La esenca ero de la pretiĝo de la diplomitoj por la plenumo de diversaj profesioj estas la lernado dum praktikoj en la daŭro de 15 semajnoj.

Studado povas esti dumtaga, vespera, perkoresponda aŭ foresta. La principa sistemo de la studado estas la tagaj studoj, escepte nur se la statuto de altlernejo determinas alie.

Por la enskribiĝo al altlernejo povas klopodi personoj, kiuj akiris la abiturientan atestilon. La principoj de allasoj al la 1-a studjaro estas difinataj memdecide de altlernejoj. Kelkaj altlernejoj aranĝas akceptajn ekzamenojn, aliaj allasas por sudoj surbaze de konkurso de pritaksoj troviĝantaj sur la abiturienta atestilo, ankoraŭ aliaj - nur surbaze de la registro.

Oni diferencigas ŝtatajn altlernejojn je: universitatoj, politeknikoj, agrikulturaj altlernejoj, ekonomiaj altlernejoj, pedagogiaj altlernejoj, medicinaj altlernejoj, altlernejoj de marmastrumado, altlernejoj de fizkulturo, artaj altlernejoj, teologiaj altlernejoj, fakaj altlernejoj, altlernejoj de la Ministerio de Nacia Defendo kaj altlernejoj de la Ministerio de Enlandaj Aferoj kaj krome neŝtataj altlernejoj kaj en ĉi aro neŝtataj fakaj altlernejoj. Ĉiuj supre menciitaj tipoj de altlernejoj povas havi la statuton de la altlernejoj, se almenaŭ unu konvena organizaĵo enkadre de ilia strukturo posedas leĝrajton por distingado per scienca grado - doktoro.

La leĝo el 27-a de julio 2005 "Leĝaro pri altlerneja sistemo" difinas du sistemojn de studado: la ĉeestan kaj forestan. La principa sistemo de studado estas la ĉeesta studado, escepte nur se la statuto de altlernejo difinas tion alimaniere. La ĉeesta studado en la ŝtata altlernejo estas senpaga, escepte de la ripetado de didaktikaj okupoj kaŭze de malkontentigaj rezultoj en lernado.

En la jaro 2008 en Pollando funkciis 464 altlernejoj (publikaj kaj nepublikaj), en kiuj studis 1 937,4 miloj da personoj en:

- 18 universitatoj;
- 18 politeknikoj;
- 5 ekonomiaj altlernejoj;
- 6 pedagogiaj altlernejoj;
- 7 agrikulturaj altlernejoj;
- 6 altlernejoj de fizkulturo;
- 34 ŝtataj fakaj altlernejoj;
- 7 teologiaj altlernejoj;
- 151 nepublikaj altlernejoj;
- 179 nepublikaj fakaj altlernejoj;
- 11 medicinaj altlernejoj;
- 7 belartaj altlernejoj;
- 8 muzikaj altlernejoj;

- 1 altlernejo de Polico;
- 1 altlernejo de ŝtatlima gardado.

Kiajn fakajn titolojn oni povas akiri en Pollando?

La fakaj titoloj donataj al diplomitoj de altlernejoj povas esti jenaj:
* licenciulo - post la fakaj studoj, kiuj daŭras 3 jarojn aŭ 3,5 jarojn,
* licenciulo de flegado aŭ licenciulo de akuŝarto,
* inĝeniero - por diplomitoj de superaj teknikaj studoj, se la teknikaj studobjektoj estiĝas ne malpli ol 50% da tuto de didaktikaj okupoj,
* inĝeniero arkitekto,
* magistro, magistro de arto, magistro inĝeniero, magistro inĝeniero arkitekto, kuracisto, kuracisto dentisto, kuracisto de veterinario, magistro de flegado, magistro de akuŝarto post la 4,5 - 6-jaraj magistraj studoj.

La fakan titolon magistro povas akiri licenciuloj kaj inĝenieroj ankaŭ post la 2-2,5-jaraj kompletigaj magistraj studoj.

Por akiri menciitajn supre fakajn titolojn studento devas sukcese trapasi ĉiujn lernobjektojn kaj praktikojn laŭ la plano de studado, prepari kaj defendi la diploman disertacion kaj sukcesi dum la diploma ekzameno.

La diplomito de altlernejo ricevas la diplomon de la fino de studoj en la difinita fako de studado, kaj ankaŭ - post sia propono - la kopion de la diplomo en la fremda lingvo.

Kiaj estas en Pollando sciencaj gradoj kaj sciencaj titoloj?

La sciencaj gradoj estas doktoro kaj doktoro habilitiĝinta en la difinita scienca kampo. La gradoj en artdomeno estas doktoro kaj doktoro habilitiĝinta en la difinita sfero de arto.

La gradon de doktoro oni aljuĝas al la persono posedanta la fakan titolon - magistro aŭ magistro inĝeniero, kuracisto aŭ alia samnivela, kiu sukcesis dum doktora ekzameno en la sfero difinita fare de la konvena organizaĵo, kaj pretigis kaj defendis la doktoran disertaĵon.

Al procezo de habilitiĝo povas esti allasita la persono, kiu posedas la sciencan gradon - doktoro kaj konsiderindan sciencan akiraĵon aŭ artisman, kaj krome prezentis konvenan disertaĵon. La agoj de tiu ĉi procezo finiĝas per la decido de la konsilantaro de la konvena organizaĵo aljuĝi la gradon doktoro habilitiĝinta.

La gradoj - doktoro kaj doktoro habilitiĝinta estas donataj en la organizaĵoj de altlernejoj kaj en aliaj sciencaj organizaĵoj, kiuj posedas la rajton aljuĝi ĉi gradojn.

La scienca titolo estas - profesoro de la difinita scienca kampo, aŭ - profesoro de la difinita kampo de arto. La titolojn de profesoro donas la Prezidanto de Pollando.

Populacio de lernantoj

En la jaro 2006 en Pollando la nombro de la personoj malpli ol 29-jaraĝaj egalis al 14 865 914, kio estis 39,0 % de la tuto de la loĝantaro, la nombro de la infanoj en la aĝo de lernodevigo egalis al 4 954 097, kio estis 13 % de la tuto de la loĝantaro. La lingvo de instruado estas la pola.

Administrado kaj financado de edukado

En la lernojaro 2007/08 preskaŭ ĉiuj lernantoj (98%) frekventadis publikajn lernejojn. Plimulto da monrimedoj por edukado devenas el la ŝtata buĝeto. Konsente kun la leĝo pri la sistemo de la edukado, lernejoj dividiĝas je la publikaj, proponantaj la senpagan instruadon kaj lernejoj nepublikaj. Nepublikaj lernejoj estas jenaj: sociaj, lernejoj de konfesiaj asocioj kaj lernejoj privataj. Nepublikaj lernejoj povas posedi aŭtorajn programojn de instruado, konfirmitajn de Ministerio de Nacia Edukado. Ili povas esti financigataj el lerneja pago de la gepatroj de lernantoj. Nepublikaj lernejoj povas ankaŭ

ricevadi financajn rimedojn el aliaj fontoj, ekzemple el privataj entreprenoj aŭ fondaĵoj. Nepublikaj lernejoj en Pollando posedantaj leĝon de publikaj lernejoj rajtas al kleriga subvencio atribuata al ĉiu lernanto. La alteco de tiu subvencio egalas al 100% de la meznombra elspezo kalkulita por la edukado de lernanto en publika lernejo. Nepublikaj lernejoj rajtas eldonadi atestilojn agnoskatajn en publikaj lernejoj kaj en altlernejoj. Ili diferenciĝas de publikaj lernejoj per individuigitaj programoj de instruado kaj per pli alta nivelo de la instruado de fremdaj lingvoj.

La 5-an de majo 2006 organiziĝis du apartaj ministerioj: Ministero de Nacia Edukado kaj Ministerio de Scienco kaj Supera Edukado. Ministero de Nacia Edukado respondecas por la tuta sistemo de edukado krom tiu en la altlernejoj, kiuj estas subordigitaj al Ministerio de Scienco kaj Supera Edukado.

Fakaj lernejoj, kiuj pli frue estis subordigitaj al aliaj ministerioj, nun subordiĝas al Ministerio de Nacia Edukado. Nur belartaj lernejoj (en la sfero de artaj fakoj) kaj korektodomoj estas subordigitaj konforme al Minsterio de Kulturo kaj al Ministerio de Justeco.

La reformo de la administracio kaj sistemo de la edukado konjektas, ke la edukpolitiko estas kreata kaj gvidata ŝtatcentre, kaj administracio kaj gvidado de lernejoj, antaŭlernejoj kaj aliaj edukejoj estas malcentraligitaj. La respondeco por la administrado de antaŭlernejoj, elementaj lernejoj kaj gimnazioj estas delegita al lokaj aŭtoritatoj. La administraciaj kaj organizaj aferoj kaj decidoj koncernantaj profitigon de financaj rimedoj fare de lernejoj estas la objekto de konsultiĝoj inter lernejo kaj organizaĵo gvidanta lernejojn, tio estas municipo (enkaze de antaŭlernejoj, elementaj lernejoj kaj gimnazioj) aŭ distrikta povo (enkaze de mezlernejoj).

Pedagogian inspekton de lernejoj garantias senpere Ministerio de Nacia Edukado, kaj en ĝia nomo taskojn en ĉi temo plenumas vojevodiaj kuratorejoj de edukado.

La esencan konsultan rolon ĉe la kreado de la politiko pri supera instrusistemo en Pollando plenumas Ĉefa Kosilantaro de Supera Edukado.

Antaŭlerneja edukado

Ĉi tiu nivelo de edukado estas la unua grado de la eduksistemo. La antaŭlerneja edukado koncernas infanojn en la aĝo de 3 ĝis 6 jaroj. Ekde la lernojaro 2004/05 infanoj en la aĝo de 6 jaroj devas fini tiel nomatan nulan klason, pretigantan por la lernado en elementa lernejo. Nulaj klasoj funkcias en antaŭlernejoj aŭ en elementaj lernejoj kaj la gvidado de ili apartenas al la taskoj de municipo.

Konsente kun la leĝo pri la sistemo de la edukado unu el la taskoj de municipo estas organizado kaj gvidado de publikaj antaŭlernejoj kaj garantiado en ili la senpagajn okupojn enkadre de la programa fundamento de la antaŭlerneja eduksistemo, en la tempoperiodo ne pli mallonga ol 5 horojn potage. Gepatroj de la infanoj restantaj en antaŭlernejo pli longtempe ol 5 horojn pagas por la pli longa restado kaj por la aldonaj okupoj. Krom tio municipoj organizas diversforman helpadon por la familioj kun etaj infanoj, vivantaj en precipe malfacilaj vivkondiĉoj.

En la lernojaro 2007/08 funkciis 16 902 antaŭlernejoj, al kiuj frekventis 871,9 mil da infanoj, kio egalis al 59,4% da infanoj en la aĝo 3-6 jaroj (ĉi nombro en urboj: 75,2%, en vilaĝoj: 39,0%) el kio 94,9% estis sesaĝuloj en nulaj klasoj kaj 47,3% infanoj en la aĝo 3-5 jaroj. Ĉi tiuj estas la plej malaltaj indikoj de la disvastigo de la antaŭlerneja edukado inter landoj de Eŭropa Unio. Eĉ en 539 komunumoj estas nek unu antaŭlernejo. Popularigo de la edukado de malgrandaj infanoj, inter tio - garantio por ĉiuj infanoj kvinaĝaj rajton de la senpaga antaŭlerneja edukado, estas unu el la ĉefaj taskoj de la Ministerio de Edukado, planataj por la jaroj 2009-2011.

La deviga edukado

La deviga edukado estas senpaga, daŭras dek jarojn kaj komenciĝas en la aĝo de ses jaroj (ekde 01.09.2009 en la aĝo de 5 jaroj).

a) **Etapoj**

	Ĝis 31.08.2009	Ekde 01.09.2009
nula klaso	Aĝo:6 jaroj	Aĝo:5 jaroj
elementa lernejo	Aĝo: 7-13 j.	Aĝo: 6-12 j.

Etapo 1 - integriga instruado, 7-10 j.

Etapo 1 - frulerneja instruado, 6-9 j.

Etapo 2 - lernobjekta instruado, 10 -13 j.

Etapo 2 - lernobjekta instruado, 9 – 12 j.

gimnazio Aĝo: 13-16 jaroj

Aĝo: 12-15 jaroj

Etapo 3 – lernobjekta instruado

Etapo 3 - lernobjekta instruado

b) **Kriterioj de akceptoj**

La ununura kriterio de la akcepto al elementa lernejo estas aĝo. Akcepto al gimnazio okazas surbaze de la atestilo, kiun ricevas lernanto post la fino de elementa lernejo (necesa estas ankaŭ la ĉeesto de la lernanto dum ekstera ekzameno post la 6-a klaso). Gepatroj estas devigitaj enskribi infanon al lernejo aŭ - en la kazo de la nula lernojaro - al antaŭlernejo, kiuj estas situitaj plej proksime de la loĝloko.

En la lernojaro 2007/08 funkciis 14 330 elementaj lernejoj kaj 7 142 gminazioj, al kiuj frekventis respektive 2 375,2 kaj 1 453,2 mil da lernantoj.

c) **Taga/semajna/jara kvanto de okupoj de lernanto kaj instruisto**

La lernojaro daŭras ĉirkaŭ 185 tagojn, ekde septembro ĝis junio kaj estas dividita je du jarduonoj. Lecionoj de la devigaj lernobjektoj (maksimume 23 lecionoj po 45 minutoj semajne je la 1-a etapo kaj maksimume 28 kaj 31 lecionoj semajne, respektive je la 2-a kaj 3-a etapoj) estas ĝenerale displanitaj dum kvin tagoj de la semajno.

La deviga leĝostato se temas pri la taskoj de lernejo kaj indikitaj formoj de la efektivigado de ĉi taskoj, montras, ke oni ne povas rigardi lernejon kiel la institucion realigantan siajn funkciojn nur enkadre de la plano de instruado dum la semajna deviga labortempo de instruistoj (pensumo). Tial do la labortempo de la instruisto ne estas difinita nur surbaze de pensumo, sed (rezulte de la difino de rolo kaj taskoj de lernejo en la artiklo 42 de la statuto Ĉarto de Instruistaro) kiel netranspasanta 40 horojn semajne. Enkadre de tiel difinita labortempo kaj fiksita por ĉi laboro rekompenco instruisto estas devigita realigi okupojn didaktikajn, edukajn kaj protektajn kun lernantoj aŭ edukitoj por ilia bono; aliajn agojn kaj okupojn montritajn en statutoj de lernejoj, kun precipa konsidero de prizorgaj kaj edukaj okupoj elfluantaj el bezonoj kaj interesiĝoj de lernantoj, okupojn ligitajn kun preparado de lecionoj, memedukado kaj faka perfektigado.

d) **Nombreco de klasoj, divido de lernantoj je klasoj**

En la lernojaro 2006/07 la proporcio de la nombro de lernantoj al la nombro de instruistaro en bazelementa lernejo kaj gimnazio egalis al 13:1. Leĝoj ne difinas normojn de la nombreco de klasoj. La baza kriterio de la divido de lernantoj je klasoj estas la aĝo.

Je la 1-a etapo de edukado preskaŭ ĉiujn lernobjektojn (krom fremdan lingon kaj religion) instruas unu instruisto. Ekde la 4-a klaso lecionojn gvidas instruistoj de diversaj lernobjektoj.

e) **Programoj kaj enhavoj de edukado**

La programa bazo por la integriga instruado estas la sama por ĉiu lernanto (kaj simile por la lernobjekta instruado).

Lernejoj (instruistoj) povas elekti klerigprogramojn kaj lernolibrojn el la listo oficialigita fare de Ministerio de Nacia Edukado, kaj ankaŭ memstare decidi pri aplikataj metodoj de instruado kaj kontrolo de la instrurezultoj. Ili povas ankaŭ prilaboradi proprajn programojn de instruado, surbaze de programa bazo kaj prezenti ilin al Ministerio de Edukado, por akcepto.

f) **Pritakso de lernantoj, promocio en pli superan klason**

Pritakso de scio kaj de kapabloj de lernantoj dum lernojaro ne estas unuecigita en la tuta lando kaj restas tute en la kompetenco de instruistaro. Taksadon oni faras surbaze de regulaj proviloj skribaj kaj buŝaj. Rezultoj akiritaj de lernantoj je la fino de ĉiu duonjaro devas esti konfirmitaj fare de pedagogia konsilantaro de la koncerna lernejo. Lernantoj, kiuj ne akiris kontentigajn rezultojn ripetas klason laŭ la decido de la pedagogia konsilantaro.

La sistemo de la ekstera pritakso enkadre de la deviga edukado entenas laŭvicajn unuecigitajn provilojn kaj ekzamenojn:

1) Je la fino de 6-jara elementa lernejo (nuntempe lernantoj 13-jaraj) - ĝenerala, deviga provilo de kapablecoj postulitaj en la programa bazo, malhavanta selekcian funkcion. Alpaŝo al ĉi provilo ebligas komenci lernadon en gimnazio, kaj ĝiaj rezultoj havigas al lernantoj, iliaj gepatroj kaj al ambaŭ lernejoj, tio estas al elementa lernejo kaj al gimnazio, informon pri la nivelo de atingoj de lernantoj. Ĉi provilo estis farita unuafoje en la jaro 2002.

2) Je la fino de 3-jara gimnazio (nuntempe lernantoj 16-jaraj) - ĝenerala, deviga ekzameno, kies rezultojn oni anoncas en la gimnazia atestilo. Ĉi ekzameno permesas kontroli kapablecojn, scipovojn kaj sciojn de lernantoj en la sfero de humanismaj lernobjektoj kaj lernobjektoj ekzaktaj (kaj de la fremda lingvo ekde 2008/09). Unuafoje la eksteran gimnazian ekzamenon oni okazigis en la jaro 2002. Rezultoj de ĉi ekzameno kune kun la pritaksoj troviĝantaj sur la fina atestilo decidas pri la allaso al mezlernejoj.

Ĉiujn ekzamenojn kaj provilojn organizas speciale kreitaj institucioj: 8 Distriktaj Ekzamenaj Komisionoj, helpataj kaj kontrolataj fare de Cefa Ekzamena Komisiono.

Mezlerneja instrusistemo kaj postlicea

a) En la lernojaro 2007/08 oni registris 2 398 ĝeneraklerigajn liceojn, kiujn frekventis 713,3 mil da lernantoj, 3 417 teknikumojn kaj profiligitajn liceojn, kiujn frekventis 652,5 mil da lernantoj, 1 769 fundamentajn fakajn lernejojn, kiujn frekvetis 235,6 mil da lernantoj kaj 3 337 postliceajn lernejojn, kiujn frekvetis 301,6 mil da lernantoj.

En septembro de la 2004-a jaro oni enkondukis du ĝenrojn de lernejoj: kompletigan ĝeneralklerigan liceon kaj kompletigan teknikumon.

b) Kriterioj de akceptoj al postgimnaziaj lernejoj

Pri la akcepto de lernanto al mezlernejo decidas la nombro de punktoj sur la gimnazia atestilo (kalkulita sur la bazo de notoj el difinitaj lernobjektoj kaj aliaj atingoj), sumigita kun la nombro de

punktoj akiritaj dum la gimnazia ekzameno. Detalaj principoj de la akceptoj estas difinataj fare de postgimnaziaj lernejoj.

c) Programoj de instruado

Ministerio de Edukado difinas la programan bazon por ĉiu ĝenro de lernejo kaj por ĉiu lernobjekto. Instruistoj povas elektadi programojn de instruado kaj lernolibrojn el la listo, pretigita en Ministerio, kaj memstare decidi pri la aplikataj metodoj de instruado kaj kontrolo, enkondukadi modernajn metodojn de instruado. Ili povas ankaŭ prilaboradi proprajn programojn de instruado, apogitajn sur la programa bazo kaj prezenti ilin por akcepto al Ministerio.

d) Atestiloj de lernantoj, promocio en pli superan klason kaj kvalifikoj de diplomitoj

Je ĉi nivelo de eduksistemo, oni kontrolas la instrurezultojn de lernantoj dum la tuta jaro similmaniere, kiel enkadre de la deviga instruado. Por la fino de lernado (escepte de fundamentaj faklernejoj) oni organizas abiturientajn ekzamenojn. Lernantoj de ĝeneralklerigaj liceoj, liceoj profiligitaj, kompletigaj liceoj kaj teknikumoj, kiuj bonŝancis dum abiturienta ekzameno, ricevas abiturientan atestilon (devigan por akcepto al altlernejo). Fundamentaj faklernejoj eldonas atestilojn de la finiĝo de fundamenta faka lernejo (rajtigantajn diplomitojn entrepreni la laboron). Postliceaj lernejoj pretigas lernantojn por la faka laboro.

La finekzamenoj de mezlernejoj estas unuecigitaj kaj eksteraj.

Abiturienta ekzameno, kies plenumo estas deviga por la akcepto al altlernejoj, konsistas el du partoj: skriba ekzameno (pretigata kaj pritaksata fare de eksterlernejaj ekzamenaj komisionoj) kaj enlerneja buŝa ekzameno (pritaksata fare de la lernejaj instruistoj).

Fina ekzameno en fundamentaj faklernejoj, teknikumoj kaj postliceaj lernejoj konsistas el du partoj: la parto skriba, kontrolanta scion kaj kapablecojn, ligitajn kun difinita profesio kaj entrepreno de ekonomia agado, kaj la praktika parto, kontrolanta kapablecojn necesajn por plenumado de koncerna profesio.

Ĉiuj proviloj kaj ekzamenoj estas gvidataj fare de speciale kreitaj institucioj - 8 Distriktaj Ekzamenaj Komisionoj, helpataj kaj kontrolataj fare de Cefa Ekzamena Komisiono.

Klerigado de neplenkapabla lernantaro (tiel nomata speciala klerigado)

La speciala klerigado konstituas la integralan parton de la pola eduksistemo, kio trovas respeguliĝon en ĉiuj komunaj leĝoj, koncernantaj klerigadon.

Infanoj estas delegitaj por la speciala klerigado surbaze de opinioj eldonataj fare de kolegio de specialistoj en psikologiaj-pedagogiaj konsultejoj aŭ de konvena alia kolegio surbaze de rezultoj de psikologiaj, pedagogiaj kaj kuracistaj esploroj.

La plimulto de infanoj kun la specialaj edukaj bezonoj kleriĝas en specialaj lernejoj aŭ en specialaj klasoj en lernejoj ĝenerale alireblaj (la nombro de ili egalas al 1,78 % da tuteco de lernantoj prizorgataj per deviga klerigado). En specialaj klasoj en elementaj lernejoj, gimnazioj kaj postgimnaziaj lernejoj en la lernojaro 2005/06 lernis 11,7 % da tuta lernantaro neplenkapabla.

Klerigado de la infano havanta specialajn bezonojn, en la ĝenerale alirebla lernejo estas ebla nur post la pozitiva opinio de la konvena kolegio kaj la konsento de la gepatroj.

Instruistaro

Instruistoj devas posedi la superan klerigon, fini la superajn studojn, kiuj dependas de tio, je kiu nivelo de edukado ili laboros.

I. La nivelo de elementa lernejo: instruisto devas fini studojn de unua aŭ dua grado (daŭrantajn 3 aŭ 5 jarojn kaj finiĝantajn, konvene, per la profesia titolo licenciulo aŭ magistro) aŭ porinstruistan kolegion (daŭrantan 3 jarojn kaj finiĝantan per diplomo).

II. La nivelo de gimnazio: deviga estas la profesia titolo licenciulo aŭ magistro.

III. La nivelo de postgimnazia lernejo: deviga estas la profesia titolo magistro.

La necesa kondiĉo de instruado en ĉiuj niveloj de edukado estas ankaŭ la finiĝo de la kvalifika pedagogia kurso. Laŭ la devigaj standardoj de la klerigado, instruisto devas posedi pretigon pedagogian, pretigon por instruado de du lernobjektoj, kapablecon uzi komputilon kaj koni unu fremdan lingvon (je la nivelo B2, B2 + laŭ Common Eŭropean Framework of Reference for Languages - Eŭropa Sistemo de Priskribo de Lingva Edukado).

La noveligita Ĉarto de Instruisto, voĉdonita la 18-an de februaro de la 2000 jaro, enkondukis kvar laŭvicajn gradojn de la profesia avanco de instruistaro:

- instruisto staĝanto,
- instruisto laŭkontrakta,
- instruisto nomumita,
- instruisto diplomita.

Instruistoj diplomitaj kun certaj atingoj povas ankaŭ ricevi la titolon de la honora profesoro de edukado.

Instruistoj staĝantoj kaj instruistoj nomumitaj havas la statuson de laboristoj dungitaj surbaze de la kontrakto (en la kazo de instruistoj staĝantoj tio estas la kontrakto por la nedifinita tempoperiodo, en la kazo de laŭkontraktaj instruistoj - por la difinita tempoperiodo); instruistoj nomumitaj kaj diplomitaj laboras surbaze de nomumigo.

En la lernojaro 2007/08 en Pollando estis dungitaj 490 500 instruistoj plenetataj, en ĉi nombro: 27 300 instruistoj staĝantoj (5,6%), 84 800 instruistoj laŭkontraktaj (17,3%), 193 300 instruistoj nomumitaj (39,4%) kaj 185 100 instruistoj diplomitaj (37,7%).

Novaj reformoj

Ĉefaj celoj de aktualaj ŝanĝoj en la edukado:

- plifortigo de la profesia posteno de instruisto;
- plivastigo de la antaŭlerneja edukado por infanoj 3-5-jaraĝaj, inkluzive de la devigo de unujara antaŭlerneja pretigo por infanoj 5-jaraĝaj;
- garantio de la pli bona allaso al edukado de plej junaj infanoj per plimalatigo de la aĝo de la komenco de la lerneja devigo al la aĝo de 6 jaroj, kio ebligos utiligon de potencialo de la instrusistemo por egaligo de ŝancoj de infanoj kaj por frua malkovrigado de iliaj kapabloj;
- la programa reformo de la antaŭlerneja edukado kaj de la ĝenerala klerigado direktita al la preciza priskribo de la rezultoj de klerigado je ĉiu eduketapo kaj pligrandigo de la aŭtonomio de lernejoj en la kreado de la eduka procezo;
- plibonigo de la kvalito de la faka klerigado, plenumado de specialaj edukaj bezonoj kaj kondiĉoj de lernado dum la tuta vivo;
- malfermo de la pola eduksistemo al la mondo, agadoj por la integriĝo de fremdlandanoj en la pola eduka sistemo kaj apogado de instruado de polaj infanoj ekster la limoj de Pollando;
- plibonigo de la kvalito de edukado pro senburokratismigo de la pedagogia inspektado kaj klara divido de taskoj inter la organoj gvidantaj lernejojn kaj de la organoj organizantajn pedagogian inspektadon, estanta la ero de racionala malcentraligo de la parto de ŝtatkompetencoj en la sfero de edukado.

Ekde la lernojaro 2009/10 infanoj de la sesa vivojaro ekhavos rajton komenci realigon de la lernodevigo en elementa lernejo. Infanoj en la aĝo 3-5 jaroj komencos la antaŭlernejan edukon en pli vasta grado. Ekde la jaro 2010/11 ĉiuj kvinjaruloj estos devigitaj trapasi la unujaran pretigon antaŭlernejan. La enkonduko de la malplialta aĝo de la komenco de lernado estas planata por tri lernojaroj - 2009/10, 2010/11, 2011/12.

Oni prilaboris la novan reformon de la edukprogramo. La celo de ĉi reformo estas adapti la enhavon de programo por la aĝo de lernantoj lige kun la malplialtigo de la lerneja aĝo kaj plialtigo de la kvalito de klerigado kaj adaptigo de la programo al la konstante pligrandiĝanta nombro de la personoj volantaj akiri mezan edukon. La reformo estas planata por la jaroj 2009-2015. La reformo de la programoj de la antaŭlerneja edukado estas direktita je la preciza priskribo de la rezultoj de la

klerigado en ĉiu eduka etapo kaj pligrandigo de aŭtonomio de lernejoj en la kreado de la efektiva klerigprocedo. Al tio servos speciale:

- kunigo de programaj bazoj kun standardoj de postuloj, estantaj la bazo por testiloj kaj ekzamenoj, en unu dokumenton - la programan bazon, formulitan en la postulema lingvo, danke al kiu instruistoj scios, kion ili instruu, kaj la gepatroj - kion devas scipovi ilia infano, por bonŝance ekzameniĝi;
- restarigo al geinstruistoj la rajton libere elekti - konvene al bezonoj kaj kapabloj de gelernantoj - programojn de instruado kaj lernolibrojn.

La preciza priskribo de la postuloj je la fino de ĉiu etapo de klerigado ebligos ankaŭ certigon de unuicigo de la instruprocedo en la sfero de lerneja sistemo.

La nova programa bazo estos deviga ekde la lernojaro 2009/2010, kun rimarko, ke ĝi estos adaptata laŭpaŝe, tio estas:

- ekde la lernojaro 2009/2010 en antaŭlernejoj, antaŭlernejaj filioj en elementaj lernejoj kaj en aliaj formoj de antaŭlerneja edukado;
- ekde la lernojaro 2009/2010 en unuaj klasoj de elementaj lernejoj kaj en unuaj klasoj de gimnazioj;
- ekde la lernojaro 2012/2013 en unuaj klasoj postgimnaziaj.

La reformo antaŭvidas la mildan transiron de antaŭlerneja edukado al la instruado en la klasoj I,II,III, en kiuj devas lerni po ne pli ol 25 infanoj. En elementa lernejo estas planata disvastigita oferto de aldonaj okupoj por lernantoj postulemaj la specialan apogon kaj por kapablaj lernantoj.

Oni planas enkonduki du fremdajn lingvojn je la ŝtupo de gimnazio; unu el ili devus esti la sama fremda lingvo, kiel enkondukita en la elementa lernejo.

Ekde la lernojaro 2008/09 ekestos la deviga ekzameno de fremda lingvo je la fino de gimnazio.

Laŭleĝe de la interkompreniĝo inter Ministerio de Nacia Edukado kaj Ministerio de Nacia Defendo, en gimnazio estos enkondukata la nova lernobjekto "edukado por sekureco", kiu anstataŭigos ĝisnunan oferton de la defendiga prepariĝo kaj estos kontinuata en postgimnaziaj lernejoj. La ŝanĝo intencas la konvenigon de programoj al la postuloj de nuntempo, ĉar la tasko de lernejo estas pretigo de lernantoj al la sekura vivo en pacaj kondiĉoj, kaj ne en milita danĝero. Gimnazianoj ekscios do pri danĝeroj aperantaj dum incendio, inundo, trafikaj katastrofoj. Ili eklernos donadi la unuan helpon, estingi la brulantan veston sur homo, estingi fajrofonton, evakuadi la propran lernejon kaj ankaŭ helpi en la kazo de manĝotoksigo aŭ kemia toksigo, elektrokutiĝo, brulvundo, frostigo aŭ trovarmigo de homa organismo. En liceo kaj teknikumo estos lecionoj pri la profilaktiko HIV kaj pri la seksa perforto.

- En la nova programbazo, kiu en pli granda grado akcentas pretigadon de lernantoj por raciaj kaj konsciaj elektoj, apud la deviga instruado ĝenerala je la nivelo de gimnazio oni proponas elekti el aro de okupoj sportaj, artaj kaj teknikaj (po 2 horoj semajne).
- Aliaj proponataj ŝanĝoj estas jenaj: plibonigo de la kvalito de ĝenerala klerigado en faklernejoj kaj teknikumoj kaj ebligo elekti lernobjektojn kaj aldonajn okupojn en liceoj kaj gimnazioj. Je la kvara etapo de edukado - en liceo - oni enkondukas profiligadon, do la lernadon de du aŭ tri lernobjektoj kun la plivastigita programo kaj aldonajn okupojn disvolvigantajn interesiĝojn: okupojn el la sfero ICT, humanismajn kaj sportajn okupojn. Teknikumo oferos pretigadon al plenumado de konkreta fako, bonan ĝeneralan klerigon, en tio lernadon de du fremdaj lingvoj kaj lernadon de du lernobjektoj kun la plivastigita programo. La kompletiga ĝeneralkleriga liceo donos eblecon plialtigi ĝeneralan klerigon akiritan en faklernejo, lerni du fremdajn lingvojn kaj du aŭ tri lernobjektojn kun la plivastigita programo. La baza faklernejo pretigos por la konkreta fako, oferos klerigon ĝeneralan je baza nivelo kaj lernadon de unu fremda lingvo.

Estas planitaj ŝanĝoj en la sistemo de eksteraj ekzamenoj.

Krom supre menciita ekzameno de fremda lingvo post gimnazio, oni proponas enkonduki matematikon kiel la devigan lernobjekton de la abiturienta ekzameno ekde la lernojaro 2009/2010. Malaperos do la deviga skriba ekzameno de la elektita fare de lernantoj lernobjekto. Tiamaniere ĉiu lernanto ekzameniĝos laŭ la sama aro da bazaj lernobjektoj. Krome lernanto povos elekti de unu ĝis tri

aldonajn lernobjektojn, je kiuj ekzameniĝos je la nivelo baza aŭ plivastigita. Ĉi elekto dependas de la postuloj de altlernejo, en kiu la koncerna diplomito celas studi.

La projekto de ŝanĝoj en la statuto pri la instrusistemo antaŭvidas la eblecon transdonadi rajtojn por la gvidado de publikaj lernejoj al la asocioj, fondaĵoj kaj aliaj privataj organizoj. La registro de la projekto klarigas, ke tia lernejo devas plu esti la publika, tio signifas senpaga kaj alirebla por ĉiuj, kaj ankaŭ kontrolata de la ŝtato laŭ pedagogia vidpunkto. Nun en Pollando agas jam 580 tiuj lernejoj.

Ekde la lernojaro 2009 estas planitaj ŝanĝoj en Instruista Ĉarto. Konsente kun tio al ĉiuj instruistoj, senkonsidere de la grado de ilia profesia avanco, kreskos salajroj. Sen ŝanĝoj restos semajna laborhoraro (pensumo), kaj enkadre de 40-hora semajna labortempo, ĉiu instruisto gvidos aldonajn okupojn, enkadre de kiuj realigados aldonajn okupojn kun infanoj, egaligante iliajn edukajn ŝancojn, disvolvigante iliajn kapablojn kaj talentojn, patronajn okupojn kaj la kunvenojn por la plej junaj infanoj.

Ministerio de Scienco kaj Altlerneja Edukado planas la reformon de la sistemo de scienco kaj supera edukado, kies la plej grava celo estas transformigo de polaj altlernejoj. Enkadre de la reformo polaj altlernejoj planas plibonigi la kvaliton de klerigado kaj de esploroj, simpligi longan kaj komplikan vojon de avanco kaj enkonduki mekanismojn devigantajn altlernejan instruistaron al konstanta scienca aktiveco, plibonigado de la kvalito de la sciencaj espoloroj kaj de didaktiko distingiĝanta per pli alta nivelo. La projekto planas pligrandigon de la stipendioj por la plej malriĉaj studentoj, por likvidi parton de barieroj en la allaso al la supera edukado kaj enkodukon de la financado de studoj per la sistemo de kreditoj ŝtatgarantiataj. La projekto antaŭvidas la ŝanĝojn en didaktiko. Klerigado estos pli ligita kun mastrumado tra tiel nomitaj menditaj fakoj - prioritataj por ŝtato, strategiaj el la vidpunkto de mastrumado. Volontigos por lernado je ĉi fakoj altaj stipendioj por la plej bonaj gestudentoj. La reformo antaŭvidas solvojn, kiuj ebligos al studentoj pli individue kaj kosente kun la personaj preferoj elektadi la amplekson kaj formojn de klerigado. Estos ankaŭ enkodukataj plifaciligoj por eksterlandaj studentoj en studado en Pollando kaj signifaj agoj por la plibonigo de la kondiĉoj de studado por la studentoj-handikapuloj.

Rezultoj de la financaj projektoj kun la partopreno de la resursoj el Eŭropa Unio realizitaj fare de Ministerio de Nacia Eduklado en la jaroj 2005-2008

Enkadre de la projektoj financataj el la resursoj de Eŭropa Unio dum la financa perspektivo de la jaroj 2004-2006 Ministerio de Nacia Edukado realigis en la jaroj 2005-2008 la programon de modernigo de la pola edukado.Ekzemploj:

a) "Pligrandigo de la allaso al edukado - la promocio de la klerigado dum la tuta vivo".
Oni elspezis 1 057 807 020,45 zlotojn kaj atingis inter alie jenajn rezultojn:
- en 802 novorganizitaj ejoj oni komencis la antaŭlernejan edukadon de infanoj el vilaĝaj teritorioj,
- 3127 lernejoj, al kiuj frekventas infanoj el la vilaĝoj, realigis proprajn programojn de evoluo,
- 11 741 bibliotekojn lernejajn kaj pedagogiajn oni ekipis per komputiloj kaj informatika ilaro,
- estis kreitaj en vilaĝoj 1114 ejoj de la foresta klerigado.

b) "Plialtigo de la kvalito de la edukado rilate al la bezonoj de labormerkato"
Oni elspezis 1 236 458 224,29 zlotojn kaj atingis inter alie jenajn rezultojn:
- oni ekipis 19 954 lernejajn komputilajn laborejojn (en ĉi nombro 392 laborejojn por lernantoj handikapuloj) per 249 013 komputilaj laborlokoj,
- oni ekipis 29 907 ejojn por la ekstera ekzamenigado
10 184 instruistoj akiris rajton por ekstera ekzamenigado,
- 565 psikologiaj-pedagogiaj konsultejoj ricevis modernan ilaron,
- 14 916 klerigaj instancoj ricevis apogon en la formo de didaktikaj kaj metodikaj helpiloj,
- 966 personojn oni pretigis por la gvidado de la konstanta klerigado je distanco,

- 70 519 kursoj, postdiplomaj studoj kaj aliaj formoj de la profesia perfektigado de instruistoj estis financiitaj el la resursoj el Eŭropa Komisiono.

Bibliografio

1. Raporto de Ministerio de Nacia Edukado (MEN) el 24.09.2008 j.
2. Raporto - Pola Buroo Eurydice - februaro 2009; bazo de informoj EURYBASE: http://www.eurydice.org
3. Informa bulteno de Ministerio de Nacia Edukado (MEN) http://www.men.gov.pl http://www.menwaw.pl/szk-wyz/wykaz/uniwersytety.php
4. Informa bulteno de Centra Ekzamena Komisiono - CKE: http://www.cke.edu.pl
5. Klakla, M. (2001) "Strukturo de la nova eduksistemo en Pollando" Образование без границ № 1.2001 (La internacia scienca revuo - redakcio Krim, Ukraino).
6. Perspektivoj de mastrumado sur bazo de scio en Pollando - (en la pola lingvo) - rezultoj de la raporto de Monda Banko, Komitato de Sciencaj Esploroj - KBN, 2004.
7. Bulteno "Polska " (Pollando) - http://www.poland.gov.pl/nauka
8. Buroo de la agnoskado de klerigo kaj de internacia interŝanĝo - junio 2002.
9. Zahorska M.,Walczak D., Pola eduksistemo kaj labormerkatoj en Eŭropa Unio - Instituto de Publikaj Aferoj - Analizoj kaj opinioj numero 51
10. Leĝo (7 septembro 1991) pri la eduksistemo (la teksto unuparta: Dz.U. 2004,Nr 256, poz. 2572, kun ŝanĝoj);
11. Leĝo (27 julio 2005) pri la supera lerneja sistemo (Dz. U. 2005, Nr 164, poz. 1365);
12. Leĝo (14 marto 2003) pri la sciencaj gradoj kaj titoloj kaj pri la gradoj kaj titolo en arto (Dz. U.2003, Nr 65, poz. 595);
13. Ordono de MEN (23 decembro 2008) pri la programa bazo por antaŭlerneja edukado kaj pri la edukado ĝenerala en laŭvicaj tipoj de lernejoj (Dz. U. el 2009 Nr 4, poz.17);
14. Ordono de MEN (el 6 januaro 2009) pri la permeso por lerneja uzado de la programoj de la antaŭlerneja edukado, programoj de klerigado kaj de lernolibroj (Dz. U. el 2009 Nr 4, poz. 18);
15. Ordono de MEN (30 aprilo 2007) pri la kondiĉoj kaj manieroj de taksado, klasifikado kaj promociado de lernantoj kaj studantoj kaj organizado de proviloj kaj ekzamenoj en publikaj lernejoj (Dz. U. 2007 Nr 83, poz. 562 kun ŝanĝoj).

Esperantigis *Stanisław Śmigielski* (2009)